


Boletín

nº 402 aprilo - junio 2013



Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
Aperanta de 1949
Numero 402

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos López
Revizio: Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj
* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn
*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Hispana Esperanto Federacio
Federación Española de Esperanto

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: 0182-1252-31-0204011961

Telefono: (34) 914468079 (bv. Lasi mesaĝon en la aŭtomata respondilo)
Poŝtelefono: 638-547-104

Presejo: Gráficas Aurora, Zaragoza
DL: M-39811-2012

Salutvortoj

Vi havas en viaj manoj la duan numeron de la jaro de nia Boletín, kaj tiu estas bona okazo por memorigi, se vi ankoraŭ ne faris, pri la neceso renovigi vian ligon al HEF. Asocioj vivas per la kontribuoj de siaj anoj, kaj tiu ĉi nia Federacio bezonas la engaĝon de ĉiuj. Ni kompreneble aludas al la kotizoj, sed ne nur: la disvastigo de nia asocio, la varbado por ĝi kaj ĝenerale por Esperanto, estas des pli necesaj en epokoj en kiuj tiom da okupitaĵoj logas nian atenton. Kaj ni ankaŭ bezonas ĉies kunlaboron, ĉar estas multaj taskoj, kelkaj el kiuj estas pritraktataj en sekvaj paĝoj, kiuj nin ĉiujn atendas.

Dume, la ordinaraj laboroj de la asocio iras glate sian vojon. Boletín jam tute reprenis sian ritmon. Aldone, ni ĵus fermis nian 72-an kongreson, kiu danke al la zaragozaj samideanoj, tre sukcesis. Ĝi donis al ni altajn kulturajn momentojn kaj amuzajn distraĵojn, okazon por renkonti amikojn, novajn kaj malnovajn, kaj tempon por pripensi la estonton. Dankon al la organizantoj, nome de ĉiuj kongresanoj kaj ĉiuj HEF-anoj.

Ni jam pensas pri nia venonta renkonto. La estraro aprobis la proponon de la andaluzaj amikoj okazigi la 73-an renkonton en la superbe bela urbo Ronda (aŭ Arundo, por uzi la esperantigon laŭ la malnova nomo). Ni havos okazon informi pli en venontaj numeroj, sed dume rezervu la unuajn tagojn de venontjara majo por ĝui nekredeblan pejzaĝon kaj mirindan amikan etoson.

Fine, ni ne forgesu atentigi ke daŭras la laboroj por modernigi nian retejon kaj nian elektronikan ĉeeston. Kiam tiu ĉi Bulteno alvenu en viajn hejmojn, tre probable nia retpaĝo havos novan vizaĝon. Vizitu www.esperanto.es kaj restu en kontakto per la novaj rimedoj. Surprizoj atendos vin, sed pri tio ni rakontos en venonta numero.

Nun, ĝuu la someron kaj, kompreneble, la multnombrajn somerajn esperantajn aranĝojn, el kiuj kelkaj en Hispanio mem. Esperantujo ne haltas eĉ dum ferioj.

José Antonio del Barrio
prezidanto de HEF

Enhavo



Kiel konvinki
ĵurnalistojn
de via regiono
raporti pri
Esperanto.
www.gazetaro.co.nr
Gazetara kampanjo ĉirkaŭ la UK

Dokumentoj alvenintaj al la biblioteko en 2012

Dum la jaro 2012 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj 26 dokumentoj:

Anonima donacinto:
Beletra almanako. Mondial, 2007- (N. 12-15)
Mangada Rosenörn, Julio. *Ferdinando VIa kaj Farinelli*. Torrent kaj Comp., [ca. 1926]
Cervantes Saavedra, Miguel de. *La genia kavaliro Don Kiĥoto de la Mancha*. Torrent, 1927
Benavente, Jacinto. *La kreitaj profitoj*. Hispana Esperanto-Asocio, 1932
Orwell, George. *Mil naŭcent okdek kvar*.
Paluzie-Borrell, J. *Diccionario esperanto-español y español-esperanto*. Sopena, 1967

Donacinto: Miguel Gutiérrez Adúriz
Steele, Trevor. *Kaj staros tre alte...* IEM, 2006
Salovaara, Eija. *Kie boacoj vagadas*. Pro Esperanto, 1994
Steele, Trevor. *La fotoalbumo. Unua volum*o. IEM, 2001
Seabra, Manuel de. *Promeso en obskuro*. IEM, 1997
Elgo, Serĝo. *Ŝia lasta poŝtkarto*. IEM, 2002

Donacinto: *Jorge Camacho*
Amaya, Jesús, komp. *Bokabulario esperanto/ispano-amerikano*. Lumen, 1934
Kropotkin, P. A. *Interhelpo, kiel faktoro de evoluo*. Impeto, 1995

Donacinto: *Carmen Alba*
Privat, Edmond. *Esperanto, kursa lernolibro*. Universala Esperantia Librejo, [ca. 1929]
Cart, Théophile. *Primeras lecciones de esperanto*. Hachette et Cie., 1912

Donacinto: *Universala Esperanto-Asocio*
Lipari, Michela. *Pri homoj kaj verkoj*. Universala Esperanto-Asocio, 2012
Bosmans, Phil. Ŝanco por feliĉo. Lannoo, 1988

Donacinto: *Manolo Parra*
Dobrzyński, Roman. *Ora Bona Espero* [video]. R. Dobrzyński, 2012
Green, Sam. *The universal language* [video]. The Free History Project, 2011

Donacinto: *José María Salguero*
Laharie, Claude. *Gurs 1939-1945*. Atlantica, 2011

Donacinto: *Toño del Barrio*
Confederación General del Trabajo. *La lengua como liberación: el esperanto*. CGT, 2012

Donacinto: *Madrida Esperanto-Liceo*
Madrida Esperanto-Liceo. *Stranga nupto* [filmo, originala kartoĉo]. MEL, 1980

Donacinto: *Ángel Arquillos*
Madrida Esperanto-Liceo. *Stranga nupto* [videa kopio]. MEL, 1980

Maje okazis maje…
(raporto pri la 72-a HEK, Zaragozo 2013)

Ne, mi ne parolos pri la mirinda romanco de la prizonulo superbe esperantigita de Fernando de Diego kaj pri kies misteraj enigmoj Kani faris sugestajn komentariojn dum la pasinta hispana kongreso, sed ĝuste pri tiu 72-a HEK.

Prave oni asertas: (Esperanto-)movado foje progresas, foje regresas... sed ĉiam kongresas. Ĉi-jare, en Zaragoza ĉirkaŭ ronda duopo ("Lingvo kaj Sento"), ni (denove) sentis la lingvon kaj lingvigis la sentojn.
Mi estis unu el la organizantoj kaj mi volas esprimi ke mi sentis min privilegiata pro la ŝanco partopreni (kaj "partodoni") en tia travivaĵo: en kiu mi kunlaboris organizeme kun homoj plenaj je entuziasmo, sindediĉo kaj iom da nervozeco pro la respondeco; en kiu tre simpatia amiko Raúl (organizinto de la kongreso en Almagro kaj kiu -ve!- ne povis veni persone al Zaragozo) skribis al mi saĝajn konsilojn (Ĝuu tion. Eble vi krios "Neniam pli!" aŭ "mi kabeos ĵus post tio" de tempo al tempo, sed ĝi iĝu speciala sperto pro vi…); en kiu mi spektis emociplaĉajn momentoj neforgeseblaj (postkongrese, prokongrese ankoraŭ sonoras en mia memoro reeĥoj de Miguel Fernández, JoMo... kaj redirendus la vortoj de Zamenhof al Vicente Inglada en 1909 post bela parolado: "Mi kreis la lingvon Esperanto por ke la homoj de la tuta mondo interkompreniĝu... kaj por ke vi ĝin parolu tiel bele!"); en kiu mi unuafoje ĉeestis esperantan kongreson kune kun mia ama(n)tino... Al ĉiuj, koran dankon! (Al ĉi lasta, dankan koron!).



Antaŭ la kongreso, plurfoje mi timetis pri kelkaj aferoj. Kiam la nombro de aliĝintoj tre kreskis mi dubis ĉu la salono ampleksus sufiĉe aŭ ĉu ni devus esti tro "molekule kune". Fojfoje eĉ alvenis al mi ia ideo: kiel bone esti organizinto kaj ne organizanto aŭ organizonto (dirante simile al pripensoj de Geraldo Mattos pri tradukado: "Tradukanto travivas multajn malfacilaĵojn. Tradukinto havas neniajn malfacilaĵojn: aŭ li ilin solvis aŭ ili lin disolvis"). Eble pro tio mia subkonscio igis foje al mi en retgrupo misskribi: la 72-a HEK okazos en 2003 (sprite Pedro Hernández komentis: ĉu la temo estos "Nostalgio pri pasinteco"?). Tamen, la organizaj farendaĵoj progresis: la Kongres-Libro eliris belaspekta kaj bonenhava (eĉ akompanata de ia "Pirata Suplemento" kiel kongres-Libero kun kromaj motoj: "Lango kaj Mento", "Drivo kaj Vento", "Tinto kaj Tento"). Kaj finfine la kongreso disvolviĝis feliĉe en ordo kaj progreso (kiel legeblas sur la brazila flago)... kaj kun iomete da ĥaoso kiu same konvenas por viv(ig)o (kiel amuza tia bombon-ĵetado dum nesolena malfermo!). Je la fino, ĉiu kongresano eliris kun dolĉaĵoj kaj vortoj en sia ujo kaj kun memoraĵoj kaj emoci-





Antaŭ la kongreso, plurfoje mi timetis pri kelkaj aferoj. Kiam la nombro de aliĝintoj tre kreskis mi dubis ĉu la salono ampleksus sufiĉe aŭ ĉu ni devus esti tro "molekule kune". Fojfoje eĉ alvenis al mi ia ideo: kiel bone esti organizinto kaj ne organizanto aŭ organizonto (dirante simile al pripensoj de Geraldo Mattos pri tradukado: "Tradukanto travivas multajn malfacilaĵojn. Tradukinto havas neniajn malfacilaĵojn: aŭ li ilin solvis aŭ ili lin disolvis"). Eble pro tio mia subkonscio igis foje al mi en retgrupo misskribi: la 72-a HEK okazos en 2003 (sprite Pedro Hernández komentis: ĉu la temo estos "Nostalgio pri pasinteco"?). Tamen, la organizaj farendaĵoj progresis: la Kongres-Libro eliris belaspekta kaj bonenhava (eĉ akompanata de ia "Pirata Suplemento" kiel kongres-Libero kun kromaj motoj: "Lango kaj Mento", "Drivo kaj Vento", "Tinto kaj Tento"). Kaj finfine la kongreso disvolviĝis feliĉe en *ordo kaj progreso* (kiel legeblas sur la brazila flago)... kaj kun iomete da ĥaoso kiu same konvenas por viv(ig)o (kiel amuza tiu bombon-ĵetado dum nesolena malfermo!). Je la fino, ĉiu kongresano eliris kun dolĉaĵoj kaj vortoj en sia ujo kaj kun memoraĵoj kaj emoci-fortoj en sia koro.



Esperanto estas mirinda okazaĵo, okazejo kaj okazigaĵo. Kaj same oni povas senti pri esperantaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Estas ŝanco por refreŝigi per verda oksigeno la esperantajn pulmojn. Kongreso estas renkontiĝo, rendevuo... celebro kaj festo...

Reirante al miaj komencaj timetoj, almenaŭ konsolis min tio, ke la daŭro de la kongreso ne estis tro longa (Probable, tial oni ne povus apliki al ni ian anekdoton. Jen: Aŭtoro al recenzisto: "Kio estas via kritiko pri la fino de mia romano?" Respondo: "Ĝi estis tro malproksima de la komenco"). Fakte, dum la solena malfermo, ia melankolia sensaĵo ekaperis en mi pro la fino. Mi mildigis ĝin per la konsola sugesto kiun mi proklamis (akompanante du poemojn de Kálmán Kalocsay kiujn mi komence emis transdoni post la inaŭguro: "Kongresa prologo" kaj "Bela programo"): La fino de io estas la komenco de alio (nova). ProgrAMO ja finiĝas per amo…



Maje ĝi okazis, maje... Tamen, gaje ĝi okazas, gaje... en mia kormemoro (ankoraŭ enkore…).

LORENZO NOGUERO

Mia sperto en la 72a Hispana Kongreso de Esperanto, Zaragozo

Inter la 3a kaj 5a de majo 2013, Zaragozo gastigis la 72an Hispanan Kongreson de Esperanto. Kun la devizo „Lingvo kaj sento“ naŭdeko de esperantaj entuziasmuloj vojaĝintaj el preskaŭ la tuta geografio de l' Iberia duoninsulo, kelkaj eĉ el eksterlando, ariĝis en hotelo Goya, la kongresa sidejo. Situanta en la privilegie historia malnova urboparto de Zaragozo, Aŭtonoma Komunumo Aragón, ĉi kongresejo konsistigis ege taŭgan lokon por demonstri plian fojon, la fakto ke lingvo kaj sento estas „du vortoj, du fortoj aŭ (eble) malfortoj de nia verda lingvo“, laŭ citaĵo el la Kongresa Libro. Krom la menciita devizo, ĉeftemoj de la konklavo estis ankaŭ pririgardo al ecoj lingva kaj senta de la literaturo kaj poezio originala kaj tradukita.

La 72a Hispana Kongreso de Esperanto estis amplene kaj profesie aranĝita de la lokaj klubanoj, kiuj sukcesis okazigi ne nur bonkvalitan, sed samtempe amuzan aranĝon preter la kutime kartonece enuaj esperanto-kongresoj. Oni sentis sin hejme, kio dankindas al la vere teame laboranta organiza komitato sub gvidado de Lorenzo Noguero, kiu aparte pinte rolis la ceremoniestron. Jam je l' ricevo de la dokumentaro rimarkiĝis ke valoris la penon flugi tien semajnfine por kunfesti. Ke oni okazigis NeSolenan malfermon kaj eĉ Interkonatigan matenon, spite al kutimoj niamedie, estis antaŭpladoj de tio, kion poste ni persone taksis kiel unu el la plej sukcesaj e-aranĝoj kiujn la lastajn jarojn ni partoprenis.

Pluraj estas la raportindaj specialaj momentoj de la aranĝo. Inter ili elstaras, dum la solena inaŭguro, la partopreno de Emilio Gastón, aragona eksa ombudsmano kaj Honora Gasto de la 72a Kongreso, kiu hispanlingve alparolis al la kongresanaro.

Emocie ni partoprenis ĉiun opan prelegon, kies prelegintoj elstaris kaj sukcesis nepre gajni ĉies atenton. Pinta estis la faka eco de la konferencoj prezentitaj far Antonio de Marco, Miguel Fernández, Abel Montagut, Jorge Camacho, Antonio Valén kaj kompreneble, la muzika prelego fare de Eduardo Berdor. Tiaj „Donkiĥotaj komentoj“, „Poezio: armilo ŝarĝita per futuro...“, la „Ludkartoj de Talismano“, „Esperanto kaj poezio“, „Kalmo kaj malkalmo ĉe Kaloksay“, „La poezi-difino“ kaj „La valsoj de Chopin“ respektive, krom analizi la temojn tre profunde, partoprenigis ĉiujn dum la enhave riĉaj diskutoj postprelegaj. Eĉ kelkaj kongresanoj kuraĝis, jen kanti, jen deklami aŭ simple kontribui per legado de poezioj kiel elmontro ke la sento, kaj kompreneble la lingvo, ja invadis l' etoson kongresan.



Miguel Fernández

Vere taŭgaj montriĝis siavice la eksterkongresejaj aranĝoj nome: la vizito al la palaco Aljaferio, kaj la muzikaj koncertoj far SoloTronic kaj JoMo. La palaco de Aljaferio estas muzeo impona kaj ankaŭ sidejo de la Aragona Parlamento. Ja taksatas kiel taŭga ĉi vizito al Aljaferio kun ĉiĉerono inkluzive, pro la simpla fakto, eble eĉ inter aliaj, ke la ĝenerala publiko havis la ŝancon aŭdi esperanton dank' al la lerta samtempa interpretado por nehispanparolantoj fare de Jorge Camacho dum la trairo.

Trafe elektitaj estis la lokoj kie prezentiĝis l' artistoj se temas pri publika agado, informado kaj eĉ taŭga poresperanta propagando. Mi certas pri pluraj junuloj kiuj ravitaj de la bonkvalita koncerto de JoMo proksimiĝis al la lokaj e-gvidantoj, el kio espereble rezultis novaj aliĝoj de komencan-toj. Mi devas reliefigi ke tiaj aranĝoj konsistigas la plej taŭgan kaj utilan manieron propagandi kaj disvastigi la lingvon zamehofan ĉi epoke. Venigi do esperanton al la homoj kaj ne male, miaopinie estas ja la vojo strategia ĉi epoke... aŭ eble unu el ili.

Ja indas emfazi la gravecon de la fako informado kiun mi ankaŭ taksas pinta antaŭ-, dum- kaj postkongrese. Pluraj amaskomunikiloj hispanaj raportis, prezentis aŭ aperigis interviujojn kun gravuloj de la movado kaj eĉ kun iu simpla esperantisto.

Kompreneble dum e-kongreso ne mankis bankedo, ankaŭ aliel aranĝite al la esperanta kutimo. Dum ĉi aranĝo speciale menciindas l' omaĝo al S-ro Eduardo Larrouy, aktiva esperantisto, kiu festis sian100-jariĝon kaj al kiu tiuokaze oni liveris memuaron nome de Hispana Esperanto Fede-racio, el la manoj de ties Prezidanto José Antonio del Barrio. Eta makulo eble estis la fakto ke vegetaranoj ricevis malabundan manĝon kontraŭ la prezo postulita, kiun oni aparte kelkcentope subvenciis. Sed kiel dirite de la plej granda el la kubanoj, kies iaman rezidejon zaragozan mi vizitis:

„Kritiki ne signifas mordi, sed signi la makulon kaj mildigi per kompatema mano, l' ombron mallumantan la belan verkon".

Ĝuste tio estis la 72a Hispana Kongreso de Esperanto: bela verko.



Abel Montagut

Alexis Otero Castellón

Svislando - Suisse

Emilio Gastón kaj la 72-a HEF Kongreso

La pasintan 26an de majo, María Zocato anoncis en Iberia Esperantistaro, ke en [http://youtu.be/YoMnxSEwE9Y] spekteblas filmeto, kie "Emilio Gastón Sanz, aragona eks-ombudsmano[1] kaj Honora Gasto de la 72a Hispana Esperanto-Kongreso okazinta en Zaragozo en 2013, hispanlingve alparolas la kongresanaron en la Solena Inaŭguro de tiu evento".

La filmeto spektindas. El ĝi emanas respekto kaj amo al esperanto kaj al homeco. Ankaŭ belo. Emilio Gastón finis sian inaŭguran paroladon –korkarese engaĝiĝintan– per verva deklamo de poemo siapluma, kiu emociis la publikon. Li, poeto, krom advokato kaj skulptisto, recitis sian lirikaĵon en la hispana kaj voĉlegis ties esperantan version, *Rompita dormo*, en traduko de mi mem. Ja tiu voĉlego ne aperas en la filmeto, sed jen mi prezentas la tekston al la legantoj de *Boletín* kun aparta danko al mia amiko Lorenzo Noguero, iniciatinto de ĉi projekto.

Rompita dormo

Hodiaŭ senprokraste pluaktivu
ni ĉiuj en la simpla tasko vivi.
Temp' estas jam de letargi-forgeso
por ke ni kantu plue kiel tiam.
Dum kiom da jarmiloj mi dormadis?
Amikoj, mi memoras,
ke antaŭ naŭ mil jaroj
mi batalis antaŭ la Trojo-pordoj.
Mi plu memoras kiam tiu Amika Mondo,
antaŭ apenaŭ dudek mil jaroj ĵus naskita...
inaŭguris fresko-ekspozicion
en laŭmoda kavern' en Altamira.

Mi de tiam
ne verkas plu poemojn!

Side sur materi' kronologia
de l' nub' de mi loĝata,
tagon post tago mi forgesis flugi
kaj, krome, deliktule mi forlasis
mian spontanan revo-manieron.

Ĉar, kun la tempopaso,
en zorgo pri brulligno kaj manĝaĵoj
la birdoj flugas,
ĉifiĝas la jarmiloj
kaj la homoj en ilojn transformiĝas,
ankaŭ la advokatoj kiel mi.

Nubumante finfine endormiĝis ene poeto
neevitеble mia, tro daŭra estis lia letargio,

sed vi alvokis lin,
eltiris lin el dormo dudek mil jarojn aĝa.

Nun, min sentante ree dupieda,
dum l' animo soriras sur la kapon,
mi reimagos kion ja neniam
oni devas imagi.
Permesos mi paroli, fari ekzaltan diskurson tutplanedan,
al ĉi poet' neevitеble mia,
al ĉi petard' lirika,
kiun dum multaj jaroj buŝoŝtopis
iloj-homoj samspecaj kiel mi.

[1]*ombudsmano*: el la angla *ombudsman*, aŭtoritatulo responsa pri esplorado de plendoj de la civitanoj kontraŭ difinita institucio. En Hispanio, ĝenerale, *defensor del pueblo de Aragón*.


Hodiaŭ senprokraste pluaktivu
ni ĉiuj en la simpla tasko vivi.
Postulu ni pliigojn de gitaroj

kaj justan distribuon de kanzonoj,
ĉar teron rajtas pli kiu ĝin kantas
ol kiu ĝin aĉetas.

Nubopensuloj tute ne havas sindikaton.
Atendu min en grotoj de ministoj,
faru mia ilian koleregon.

Ni devas multon fari en kuneco,
revuloj ĉiulandaj,
ĉu do ni unuiĝu?

Miguel Fernández


Emilio Gastón Sanz

Gazetara eĥo de la Kongreso

La Hispana Kongreso tre bone eĥis en la amaskomunikiloj, pri kio ni devas danki ĉefe la bonan laboron de nia zaragoza amikino, la ĵurnalisto Beatriz Pitarch, kaj la apogo de Ricardo, la komisiito pri gazetaro de HEF.
La lokaj kaj regionaj amaskomunikiloj plurfoje raportis pri la kongreso. Indas mencii la du aperojn en la Aragona Televido, unue per longa intervjuo al Beatriz kelkajn tagojn antaŭ la kongreso, kaj poste per kompleta raporto en la novaĵoj dum la tagoj de la evento mem. Ankaŭ menciindas la intervjuo al kantisto JoMo en la stacio SER, kun kantoj vive.
Plej frapa raporto estis tiu de la televidstacio La Sexta, kiu elsendis raporton dum la du novaĵprogramoj de la dimanĉo 5-a de majo. Iom surprize, eĉ se ĝi aludis la kongreson, la programo estis filmita en Madrido, kun la partopreno de samideanojn kiuj diverskiale ne povis ĝin ĉeesti. Oni povis spekti nian sidejon, kun kvazaŭ klaso kun Alejandro Pareja, Jorge Pavón, Pedro Hernández kaj ties ĉi filinjo Jasna.
Post la kongreso, nova gazetarkomuniko rezultis en du intervjuoj al HEF-prezidanto. La unua en la frumatena programo de Radio Nacional de España "Esto me suena", kaj kelkajn tagojn poste dum preskaŭ duonhoro en la radiostacio Intereconomía.
Ni ne devas forgesi la plej ekzotan: gazeto de la hispanparolantoj loĝantaj en Pollando "Polska Viva" verkis artikolon pri Esperanto, kun paroloj de la prezidanto de HEF. La teksto aperis en ambaŭ lingvoj, la hispanan kaj la polan.
Memoru ke ĉiuj informoj estas alireblaj en la fako "gazeteltondaĵoj" de nia Bitoteko, en la retadreso http://bitoteko.esperanto.es. La televidaj elsendoj estas spekteblaj en Youtube, kune kun tre interesaj raportoj pri nia kongreso kiujn oni povas trovi en nia kanalo http://www.youtube.com/user/esesperanto/.
HEF celas kunlabori en la gazetarkampanjo organizita tutmonde fare de UEA ĉirkaŭ la Universala Kongreso. Ne hezitu kontakti nin se vi deziras partopreni.

HEF

La koncerto de JoMo

Kontrakti JoMon por la Hispana Kongreso ŝajnas logika elekto. Ĝi estas konata muzikisto en la movado, loĝanta en Tuluzo, urbo relative proksima al Zaragozo, fakte, pli ol urboj sude de la duoninsulo, kaj krome de antaŭ jaroj li ne estis aperinta en renkontiĝoj en Hispanio, laŭ mia scio.

La sidejo de la koncerto estis sufiĉe nekutima. Anstataŭ muziki en la kongresejo mem, ni serĉis trinkejon, kiu ofte okazigas rokajn koncertojn, por ke eksterkongresanoj povŭ ĉeesti la koncerton, por konstati la vivecon kaj viglecon de nia lingvo. Fakte, post la intervjuo en loka radiostacio, ni povus rimarki, ke kelkaj ĉeestantoj tute ne scipovantaj Esperanton ĝuis ĝin.

Vi tre eble jam konas JoMon. Mi neniam spektis lin antaŭe. Multe impresis min lia kompetenteco. Mi pensis erare, ke li estis bonega amuzisto, sed mi ne atendis, ke li kantu tiel ĝuste kaj ke ludu tiel lerte. Nur per akustika gitaro, li sukcesis anstataŭigi basgitaron, baterion kaj kompreneble elektran gitaron, ĉio per pedaloj, tiel muzikisto povas ludi kvazaŭ li estus akompanata de vera bando.


JoMo

Pozitiva aspekto estis ke plej aĝaj homoj kiel Eduardo Larrouy restis kaj ĝuis la koncerton. Mi proponas la vi liston da kantoj, kiujn li prezentis. Mi ne garantias, ke mi memoras ĉiujn, sed ili estas la plimulto sendube. La ordo tute ne samas al tiu de la koncerto, sed vi scias, ke la memoro elektas:

- Ras, dva, tri: slave ritma kanto, ankaŭ kantata en la ukraina. La spektantoj devis ekkrii "Ras, dva, tri" en precizaj momentoj. Ŝajne tio signifas "unu, du, tri" en slavaj lingvoj, kvankam "ras" signifas senkuntekste "fojo".

La virbovo kiu ekamis la lunon: klasika hispana kanto, iel malmoderna, sed tre danciga.

La bambo: ne povas manki la unua hispanlingva roka kanto kiu sukcesis en Usono kaj, kiu iĝis tutmonda tuj poste.

- Dum la IJK: Unu el liaj plej famaj kantoj, spektebla ĉe: www.youtube.com/watch?v=m8E8-7nQDrU

- Kanto en la okcitana: mi ne kaptis la nomon, mi bedaŭras, sed li klarigis, ke li estas unu el la defendantoj de tiu lingvo kaj ke li faris tiun ĉi kanton por helpi revivigi la lingvon sudcentra Francio.

Sur la Bayou: kanto bazita je la folka kanto "On the Bayou de Hank Williams. Laŭ mia memoro, li kantis kaj en la angla kaj en Esperanto.

- Sexy Esperanto: la plej spektata kanto de JoMo ĉe jutub , en la angla. Se paroli pri muziko, miaopinie ĝi estas lia plej bona originala kanto Vidu: www.youtube.com/watch?v=EwvShI5hhao

- Luphom' en Pariz': tradukita de Manolo Pankorbo, ĝi est hispana Lobo Hombre en París, 90jara kanto kiu iĝis la plej fama kanto de la bando La Un n. Ĝi ankaŭ estas spektinda ĉe jutubo: https://www.youtube.com/watch?v=lskAH3RqnBY

- Kontraŭ glas 'da kvas: Li klarigis, ke en slavaj landoj, spe ife en Ukrainio, oni trovas bongustegan freŝan trinkaĵon. Maljunulinoj vendas ĝin surstrate. En kanto, li rakontas, ke kontraŭ glaso da tiu trinkaĵo li farus ion ajn.

- Movu viajn ...: Mi ne certas pri la nomo. Temas pri la kanto Pata Pata, de la mirinda sudafrika Miriam Makeba. JoMo instruas al mi la korpopartojn per amuza kanto. Post liaj indikoj, la ĉeestantoj devis movi la kapon, okulojn, genuojn... eĉ orelojn!

- La cucaracha (La blato): papelbrume li ankaŭ interpretis la meksikan. Ĉiam estas amuze aŭskulti tiajn kantojn.
Gratulon se vi ĉeestis kaj memoras aliajn kantojn.

Mi ne volas fini sen mencii kaj denove gratuli la ejon. La teĥnikisto faris bonegan laboron kaj la pentraĵoj super la muroj aldonis plian detalon al la etoso.

Eduardo Berdor



72 HEF-Kongreso.- Zaragozo

Vizito al la Palaco Aljaferio

Tiu ĉi palaco datas de la duono de la 11-a jarcento, kaj estas unu el la malmultaj kiun oni konservas relative komplete de la arkitekturo hispana-muzulmana, kaj ĝi estis konstruita sub mendo de la dua monarĥo de la Zaragoza Tajfo, Abu Jafar Ahmed al-Muqtadir Billäh, kiu regis la tajfon de la jaro 1046 ĝis 1082, la plej longa regado de ĉiuj tajforeĝoj de Al-Andalus. Oni ĝin konstruis kiel distra vilao aŭ "amuza domo" kaj oni nomis ĝin *al-Ya'fariyya* (Aljaferio) aŭ *Qasr Där al Surür* (palaco de la Ĝojo), ĉe kies belaj salonoj okazis la oftaj festoj de la kortego, kaj kie la grandaj poetoj, kiujn al-Muqtadir malavare protektis, verkis kaj recitis la plej bonajn poemojn. Tiu reĝo, al-Muqtadir, amis sciencon kaj poezion, kaj la historiisto al-Saqundi (n. 1231) diris en sia verko "La hispana islamo": "Vi havas reĝon, al-Muqtadir, sinjoro de Saraqusto, vere mirinda saĝulo pri astronomio, filozofio, geometrio kaj poezio". Efektive, elstara matematikisto, li verkis ankaŭ belajn poemojn, kaj al la palaco Aljaferio, kiun li ordonis konstrui li dediĉis jenajn versojn:

Al la palaco Aljaferio

Ho, plezurpalac' de Ĝojo!
Ho, salon' el or' kaj brilo!
Mia cel' en vi kroniĝis,
fakt' el miaj iluzioj.
Se en mia tuta regno
mi ne havus ja alion,
certe restus mi kontenta,
ĉar en la profunda mio
estas tiu alkazaro:
mia plej ĝojig-atingo



Post longa regado (34 jaroj) forpasis al-Muqtadir kaj okupis la tronon de Saraqusto lia filo al-Mutamin, homo kun profunda inklino al studado, vera intelektulo, pri kiu oni scias ke li estis elstara matematikisto kaj poeto. Oni ankaŭ scias ke li multe amis celebri dumnoktajn festojn sur la rivero Ebro, kaj la kronisto Fath ibn Jaqän rakontas unu el ili:

"La ŝipeton de la princo ĉirkaŭis multnombraj barkoj; la melodioj de la kordinstrumentoj (precipe liutoj) estis tiel belaj, ke la navigantoj sin sentis devigataj halti por ĝui la magion de tiuj sorĉaj muzikoj kaj ofte mutiĝis ĉar krom la muziko ofte oni recitis belajn versojn, kiel tiuj kiuj priskribas Ibn Hasdäy:

Ho, mirinda bela tago!
kiom brila je tagmezo,
ĝi sin montris vivkolora
per la oro kaj arĝento
forrabitaj de tagiĝo
kaj de sun-radi' vespero!
Oni dirus ke indulge,
nun denove la vetero
nin deziras rekompenci
post ventego kaj tempesto.

Sur la barko princ' Mutamin
ĝuas navigante river' Ebron!

La poemoj kaj la historio de la reĝoj de Saraqusta estas tre, tre allogaj, sed ni devas daŭrigi la historion pri la palaco Aljaferio.

Post la konkero de Zaragozo fare de Alfonso la 1-a en la jaro 1118, la Aljaferia palaco restis kiel sidejo de la kristanaj monarĥoj, kiuj ofte remodeligis kaj ampleksigis ĝin supermetante novan etaĝon sur la muzulmana konstruaĵo. La plej gravaj konstruoj estis tiu sub regado de Pedro la 4-a dum la 14-a jarcento, kaj precipe tiu de la Katolikaj Gereĝoj je la fino de la 15-a. Ankaŭ dum tiu kristana epoko, la Aljaferio estis scenejo de multenombraj festoj kaj celebradoj, kaj post tiu hela epoko ĝi estis sidejo de la Inkvizitora Tribunalo, kiu okupis la palacon ĝis 1706.

Post multaj jaroj de forlaso, la Belarta Ĝenerala Direkcio de nia lando komencis ripari kaj restarigi la palacon Aljaferio, kaj tiel estis kiel iom post iom reaperis la belegaj profiloj de tiu bela muzulmana palaco: Nun oni povas eniri tra hufoferforma pordo, kalifa tipo, inter du murkuboj. La unuan lokon kiun la vizitanto trovas estas la tiel nomita korto San Martin, dekstre, kun la preĝejo kies nomo ĝin prenas, verko de la 14-a jarcento. Ekde tiu ĉi korto, apud la enirmuro, oni eniras en la tiel nomitan korton de Sankta Isabel tra pordo triarka, tre ornamita. Estas tiu ĉi la centra korto de la muzulmana palaco. Antaŭe ĝi estis ornamita de du basenoj kaj ĝardenoj. Ĉe la suda portiko –maldekstre de la aktuala korteniro- staras nun la belegaj arkoj plurlobaj kovritaj de riĉega dekoracio.

Ĉe la norda portiko, estas videblaj la plej granda parto de la salonoj. Unue "la granda salono", enmarkita de grandaj plurlobaj arkoj kun belegaj kapiteloj tajlitaj en alabastro laŭ stilo el korinta kapitelo. Komunikas tiu ĉi al hejm-kapelo, ne korekte nomita moskeo. Oni eniras ĝin tra pordo de hufferaforma arko, enmarkita en ornama profilo, kun abunda dekoracio interne de la arko, kaj ĉirkaŭ ĝi, farita per speciala gipso ĉizita. Interne, la hejmkapelo estas oktogonforma. Malsupre ĝi estas ornamita tre abunde per miksliniaj arketoj, escepte tiu parto kiu korespondas al la eniro kaj al "mihrab", aŭ niĉo orientigita al Mekko. La "mihrab" estas ornamita kaj la arko kiu ĝin enmarkas estas laŭ kordova tipo.



La dua etaĝo estas konstituita de malgranda tribuno kun mudeĥaraj pentraĵoj de la 13-a jarcento kaj ĝi estas kovrita de moderna volbo kun krucigitaj arkoj. La kapiteloj estas laŭ kordova tipo. Ekde "la granda salono" kaj tra malgranda korto kun miksliniaj arkoj, oni alvenas en la marmoran salonon, tiel nomita pro la platŝtonoj kiuj kovris la plankon. La dekoracio estas situata sur la supera parto de ties muroj, kun diversaj motivoj, precipe arketoj kaj ornamoj gipse ĉizitaj.

Tra malgranda korto oni alvenas en la ĉefturon de la Trobadoro, kie Garcia Gutierrez disvolvis parton de la agado de sia samnomata dramo. Ĝi estis la ĉefturo, kaj kvankam ĝia konstruo devenas de la 9-a jarcento, oni surmetis novajn etaĝojn dum certa tempo, kiu iras de la 11-aa ĝis la 14-a jarcento.

Ankaŭ ekde la "granda salono" oni povas pasi al la salonoj de la Katolikaj Gereĝoj. La ampleksa "ceremonia ŝtuparo" kovrita de plafono tempere pentrita, kun emblemoj de la Gereĝoj: jugo kaj sagoj kaj la lemo "Tiel rangas", prezentas verandon gipse ĉizita per gotikaj motivoj, tute same kiel la dekoracioj de la grandaj fenestroj kiuj lumigas ilin. La palaco, en sia strikta senco, konsistas esence pri galerio, ĉe kies fenestroj kaj pordoj pretigas la iradon al la "orumita salono" aŭ tronsalono, kaj ankaŭ al la salonoj nomitaj "de la perdiĝintaj paŝoj". La fundamenta ĉambro estas la tronsalono, ampleksega salono rektangula superkovrita de belega kaj okulfrapa mudeĥara plafono, konsistanta el du partoj: belega verando sub kie sin etendiĝas skribaĵo kiu citas la gereĝojn kaj iliajn titolojn, kaj la dato kiam tiu salono estis finkonstruita: la jaro 1492. Super tiu ĉi galerio komencas la belega kasonplafono ornamita per gotikaj kaj mudeĥaraj elementoj. Je la fino de tiu alo, kaj ĉirkaŭante la tronsalonon, estas la tri salonoj de la "perdiĝintaj paŝoj", kovritaj de belaj lignaj ornamaĵoj kun elementoj gotikaj kaj mudeharaj.

Ĉe la malsupra parto de la palaco Aljaferio, maldekstre, oni konstruis kaj nun funkcias la Aragona Parlamento.

Antonio Marco Botella

73-a Hispana Kongreso de Esperanto Arundo (Ronda) 2014

Andaluzio aranĝos la venontan HEK kaj por okazigi turisman specialan eventon, la LKK elektis la historian urbon Ronda, (Arundo en esperanto). Nia celo estas montri la kulturon de nia regiono ĉefe pere de la flamenka literaturo kaj diversaj kulturoj, precipe la maŭra.

En Arundo ni povos ĝui promenante sur la Ponto Nova kiu konsistas, kune kun la Toreejo "Real Maestranza de Caballería de Ronda" la simbolo kaj animo de la urbo. La muregoj kaj islamaj pordegoj. La situo de Arundo sur rokoza monteto, atribuis al ĝi laŭlonge de la historio, markitan kaj defendan strategion. Dum la islama epoko, oni distingis la Muzulmanan Medinon, klare limsignita, laŭlonge de la natura baro de la gorĝo fosita de la Guadalevin ĝis la muregoj de la urbo mem.

La arabaj banujoj. Ĉi termobana areo de la muzulmana epoko estas la plej bone konservita de la Iberia Duoninsulo. Troviĝas ĉe la Antikva Islama Suburbo, nuntempe nomita Kvartalo de Sankta Mikaelo ĉe la suburbo de la tiama Muzulmana Medina Arundo.

Ni plu informos pri Arundo en venontajn bultenojn, ĉar la Kongreso okazos lde la 1-a ĝis la 4-a de majo 2014, profitante la feston kaj semajnfinon.





La limdato por mendi servojn (hotelajn tranoktojn, ekskursojn kaj bankedon) por la 98-a UK, pere de UEA, alproksimiĝas.
Ĝis la 1-a de majo 2013 oni povos mendi servojn sen krompago. Post la 1-a de majo 2013 la reta mendigo estos fermita kaj ĉiuj mendoj altiĝos je 20 EUR aŭ 40 EURO depende de tio, ĉu oni mendos loĝadon aŭ ne. UEA garantias la prezojn de la Dua Bulteno nur ĝis tiu limdato.

Bona novaĵo por tiuj, kiuj deziras partopreni en tuttaga ekskurso al Kulusuk en Gronlando, sed ne sukcesis mendi lokon en la merkreda ekskurso: UEA sukcesis rezervi kelkajn lokojn en la flugo al Kulusuk en ĵaŭdo, la 25-a de julio. La minimuma nombro de partoprenantoj en la ĵaŭda ekskurso estas 10 personoj kaj la prezo estas 595 EUR.
Eblas rezervi lokon en ĝi ĝis dimanĉo, la 27-a de aprilo, pere de la reta mendilo (prefere) aŭ pere de retmesaĝo al kongresoj@co.uea.org. En lundo, la 28-a de aprilo la Kongresa Fako kontaktos la mendintojn por informi ĉu la minimuma nombro estis atingita.

Ĉar julio estos alta turisma sezono en Islando kun amaso da turistoj, malfruaj mendantoj riskas ne trovi lokojn en la plej bonaj hoteloj/gastejoj.

Pliaj informoj kaj ligiloj al i.a. la Dua Bulteno kaj reta mendilo troviĝas en http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html.

21a Internacia Esperanto – Semajno de la Kulturo kaj Turismo-2013

LLORET DE MAR estas municipo, kiu troviĝas en la kataluna distrikto teritoria "La Selva" (La arbaro) en la provinco de Girona kaj en la hispana aŭtonomio Catalunya (Katalunujo).

Al municipo de Lloret de Mar apartenas ankaŭ diversaj urbanizoj; Sant Pere del Bosc, Roca Grossa, les Alegries, Santa Cristina, Fenals, Pegueres, la Montgoda, la kvartalo de Lloret de Dalt... Kvankam oni devas aldoni, ke Lloret de Mar, kiel ĉiuj katalunaj apudmaraj urboj kreskas konstante, kvankam la aktuala krizo bremsas tiun ekspansion, sed malgraŭ ĉio, daŭre oni konstruas hotelojn, ĉar la turismo tre evoluiĝas en ĉi tiu urbo ĉiujare. Oni diras, ke nuntempe estas 126 hoteloj.

La baza ekonomio de la urbo kuŝas en la turisma industrio. Lloret estas la plej fama turisma centro de la "Costa Brava" (=Klifa Marbordo). Ekde la 60-a jaroj , kompreneble de la pasinta jarcento, la influo de la turismo ŝanĝis la vivformon de la enloĝantoj. Oni konstruis multajn urbanizojn kaj hotelojn. Lloret en tre proksima pasinteco dependis de la fiŝkaptado kaj agrokulturo. Ankoraŭ restas tiuj malnovaj kaj tradiciaj ekonomiaj fontoj, kiel la meĥaniko, elektro, ligno, kemio kaj nutro-varoj. Sed, kiel dirite, la turismo regas la tutan ekonomion de la urbo.

Tago de la Libro

La 28-an de aprilo disvolviĝis la Tago de la Libro en la madrida kvartalo San Fermín (Usera) fare de la asocio de tieaj loĝantoj Asociación de Vecinos de San Fermín. Ĝi okazis en la Gastejo San Fermín, kiun mastrumas tiu asocio kaj kie disvolviĝis la IRo 2013 dum pasinta marto.

La agado havis unuflanke socian intencon, ĉar la najbaroj celas de antaŭ jaroj la konstruadon de publika biblioteko en la kvartalo, kiun la urbestraro estis jam antaŭe promesinta, per oficialaj dokumentoj. La promeso estos verŝajne rompita, sed la kvartalo ankoraŭ konservas sian peton, kiun ili konsideras konstitucia rajto. Aliflanke, temis pri partoprena agado, en kiu infanoj kaj plenkreskuloj faris omaĝon al la libroj kaj la legado.

Tial, oni prezentis libron titolitan "Sklodowska Curie, una polaca en París" (polino en Parizo), kaj oni invitis la aŭtorojn Belén Yuste kaj Sonnia L. Rivas Caballero, kiuj verkis biografion pri tiu grava sciencisto, pli konata kiel Maria Curie. Dum la prezentado oni legis diversajn memorindajn citaĵojn de tiu granda virino, en diversaj lingvoj, kiel la pola, la angla, la franca, la rusa. Kaj ankaŭ nia samideanino Matilde Montero legis jenan citaĵon en Esperanto:

> "Ni ne povas esperi, ke ni konstruu pli bonan mondon sen plibonigi la homojn. Tial, ĉiu el ni devas labori sian propran perfektigon akceptante sian parton da respondeco en la ĝenerala vivo de la Homaro, ĉar nia propra devo estas helpi tiujn, al kiuj ni povas esti utilaj."

Post la prezentado, oni legis pecojn de diversaj konataj literaturaj verkoj, kaj Mati havis tre afablan konversadon kun la aŭtorinoj, kiuj komentis ke iu el iliaj avoj estis esperantisto, kaj ke la legado de tiu mallonga frazo en Esperanto vekis en ili memorojn pri la infaneco kaj la geavoj.

Kiel tradicie, dum la tagoj ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Libro, en la madrida kulturcentro Círculo de Bellas Artes oni laŭtlegis sinsekve la tutan verkon Don Kiĥoto, de Cervantes.

Kaj ankaŭ kiel jam tradicie, tie enestis peco en Esperanto. La 23-an de aprilo, ĉirkaŭ la 5-a vespere, Toño del Barrio kaj Miguel Fernández legis kelkajn paragrafojn el la komenco de la dua parto.

La legadon eblis sekvi pere de la reto, ene de la retejo de la Círculo.

HEF



Círculo de Bellas Artes (Madrido)

Niaj Kluboj (Kantabrio)



KantEA (Kantabra Esperanto-Asocio) faris drastan ŝanĝon en la konsisto de sia estraro. Miguel Gutiérrez Adúriz, kiu prezidis la asocion dum tre longa periodo, montris sian deziron ne plu kandidati al la prezidanteco. Ankaŭ la sekretario Pedro Ullate, la kasisto Susana Gutiérrez kaj la voĉdonanto Fina Diez esprimis sian deziron forlasi sian postenon al homoj kun novaj fortoj. Tial, post enketado inter la membroj, oni venis al kompromisa solvo kaj la Ĝenerala Kunsido, okazinta en Santander la unuan de marto de 2013, elektis novan estraron. La prezidanto de tiu estraro estas la 29-jara Rafael Moncalián, kiu eklernis la lingvon antaŭ iom pli ol unu jaro. Ankaŭ novas en la estraro la kaŝisto, Rosario Diaz, kaj la du voĉdonantoj, Pablo González kaj Alberto Corral. Nur la sekretario, Ángel García, jam agis antaŭe, ĝuste en la sama posteno.

La nova prezidanto de KantEA, Rafael Moncalián, vizitis la du lastajn kongresojn de HEF, kun la celo ekkoni la movadon. Kaj li jam sin proponis al la prezidanto de HEF, ne nur por apogi la Federacion ĉe ĝia agado, sed ankaŭ por profiti de la oportunoj, kiujn la tutlanda asocio proponas al siaj aliĝintaj asocioj.

Cetere, la agado ĉe kantEA daŭras pli malpli same, t.e. la membroj kunvenas ĉiuvendrede, kaj ĉiun unuan vendredon de ĉiu monato oni faras komunan vespermanĝon. Ankaŭ unufoje en la monato oni faras tuttagan ekskurson al apudaj regionoj. En marto oni vizitis la valon de Camargo, en aprilo Rasines, en majo la groton Tito Bustillo en Asturio.

KantEA ĵus petis la panelojn preparitajn de HEF por informi pri la esperanta movado.

M. Zocato

Andaluzio (Malago)

En Malago daŭre okazas kunsidoj ĉiuĵaŭde, ĉe la trinkejo "Esperanto", kie ni babiladas pri diversiaj aferoj en esperanto kaj en la hispana. Laste, la ĉefa temo estas la Andaluza Kongreso okazonta en la bela urbo Jerez de la Frontera, kiu okazos en la komenco de aŭtuno, ĉar la vetero estas relative agrabla kaj en tiu epoko, laŭ la kalendaro pri esperantaj eventoj ne okazas multaj kaj ni profitos la okazon inviti homojn el la tuta lando por ĝui agrablan semajnfinon.

Granado De la 6-a de junio ĝis la 16-a de julio, la grupo de Granado gvidos bazan kurson de Esperanto per Ateliero en la Junulara Domo: C/ Verónica de Magdalena, 23-3º. Plian informon: esperantoengranada@blogpost.com.es   esperantoengranada@gmail.com

Bitoteko kreskas… kaj bezonas vian helpon

Jes, Bitoteko kreskas. Ne nur pro la dokumentoj el Biblioteko Juan Régulo sed ankaŭ danke al la materialoj devenantaj el aliaj fontoj. Indas mencii inter ili la jenajn: Museu d'Esperanto de Subirats, Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet, Esperanta Gazetejo, la kolekto de retlibroj eldonitaj de Franko Luin (eLibrejo) kaj la revuoj provizitaj de kelkaj Esperanto-grupoj. El tiu vidpunkto Bitoteko plenumis unu el la ĉefaj celoj proponitaj kiam startis la projekto. Cetere, ĝi atingis jam la ciferon de 3500 dokumentoj kaj la intenco estas plu kreskigi la kolekton. Kaj laste, sed ne balaste, Bitoteko aliĝis al Europeana, projekto financita de la Eŭropa Komisiono por krei publikan eŭropan bitotekon, kiu donu aliron al la kultura kaj scienca eŭropa heredaĵo. Tion atingis Hispana Esperanto-Federacio (HEF) pere de demarŝado ĉe la Hispana Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sportoj, kiu interesiĝis pri nia kolekto, aligis Bitotekon al Hispana kaj peris ĝian aperon en Eŭropeana.

Faktoj montras, ke Bitoteko estas tre grava projekto en kiu kunlaboris ĉiuj homoj starantaj malantaŭ la antaŭe menciitaj organizoj. Bitoteko estas do kolektiva sukceso kiu realiĝis ankaŭ parte ĉar la estraro de HEF subtenis ĝin kiam ĝi ankoraŭ estis nur revo. Kaj HEF daŭre subtenas ĝin. Sed nia infano kreskis rapide kaj la spaco en la servilo kie ĝi gastis elĉerpiĝis. Tio signifas, ke ni devas gastigi la kolekton en pli granda servilo kaj la tiucelaj elspezoj ankaŭ konsiderinde kreskos. Malgraŭ la buĝetaj klopodoj de HEF, Bitoteko riskas ne disponi sufiĉan financadon por daŭrigi sian disvolviĝon, kio ja estus tre bedaŭrinda. Tial HEF lanĉos regule kampanjojn por varbi monkontribuantojn kaj tiucele malfermis konton en PayPal alireblan el la ĉefpaĝo de Bitoteko. Ankaŭ eblas fari mondonacojn pere de la kontoj de HEF en la banko BBVA: 0182-1252-31-0204011961 (IBAN: ES85 0182 1252 3102 0401 1961) kaj UEA: hefb-m. Sufiĉas, ke oni indiku kiel koncepton "Bitoteko". Eĉ kontribueto estos utila, vi scias: el malgrandaj akveroj fariĝas granda rivero.



Via kontribuo estas necesa, via helpo permesos al ni teni la servon:



Tamen, mono ne estas la sola maniero per kiu eblas kunlabori. Grupoj kaj asocioj povas okupiĝi pri la bitigado de siaj gazetoj kaj bultenoj, kompreneble sekvante la teknikajn indikojn ricevotajn. Tiuj dokumentoj estas aparte gravaj por historiaj esploristoj, (Bitoteko jam ricevis plurajn gratulojn pro la jam alŝutitaj) kaj endas disponigi ilin en la reto, ĉefe tiujn eldonitajn en Hispanio. Gravas la kunlaboro de la grupoj ĉar povas okazi, ke HEF disponas nur kelkajn numerojn de la koncerna gazeto aŭ ke simple ĝi ne troviĝas en ties biblioteko. En ambaŭ kazoj estus oportune enbitotekigi la kompletajn jarkolektojn.

Fine, eblas kunlabori helpante en la tasko igi teksto-rekoneblaj la unuajn dokumentojn alŝutitajn. Tiam HEF ne disponis libroskanilon kun OSR, optika signorekono (*OCR, Optical Character Recognision* en la angla) kaj ni prokrastis ĉi lastan paŝon ĝis ni disponos la taŭgan instrumenton. Ĝi jam troviĝas en la HEF-ejo sed la laboro amasiĝas kaj helpo tre bezonatas kaj bonvenas.

Kontaktu nin (biblioteko@esperanto.es) por ricevi instrukciojn se vi aŭ via grupo pretas kunlabori. Onklo Zam volas vin por Bitoteko!

Biblioteko Juan Régulo Ligiloj: Bitoteko: http://bitoteko.esperanto.es
Hispana: http://hispana.mcu.es/   Europeana: http://www.europeana.eu

Ana Manero



86-a SAT-Kongreso, lastaj novaĵoj kaj ŝanĝoj

Mi atentigas pri la apero de gravaj ŝanĝoj, kiuj devigas al ni nuligi grandan parton el la ĝis nun senditaj informoj, kiuj devos esti anstataŭitaj per ĉi subaj.

La nova kongresejo-loĝejo nomiĝas "Colegio Mayor Universitario Chaminade", kiu estas ampleksa universitata studenta restadejo, situanta en Madrido, Paseo Juan XXIII, 9. Ĝi staras apud metroo-stacio kaj bus-haltejo. Ĉi loko enhavas ĉion bezonatan, kaj disponigos, kompleze al ni, ĉion senpage (eĉ sporto-ludejojn kaj naĝejon). La salono por prezentadoj (muziko, teatraĵoj, solenaĵoj...) estas aparte alloga, disponanta 191 sidlokojn. Ĉiuj salonoj, kie disvolviĝos la diversaj kongreseroj, estas klimatizitaj.

La ĉambroj estas individuaj, ĉiuj enhavas propran banĉambron. Ili disponas ankaŭ pri senpaga ret-konekto (eblas ankaŭ ret-konektiĝi en ĉiuj komunaj areoj de la rezidejo kaj en aparta, libere uzebla, komputil-ĉambro). La prezo estas 43 € ĉiutage. En tiu prezo estas inkluzivata la manĝoservo (matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo). Ne eblas disdividi loĝadon disde manĝado. La ĉambroj estas purigataj unufoje ĉiun semajnon, kun ŝanĝo de lit-tukoj kaj tualet-tukoj. Krom la kongres-tagojn, eblas antaŭmendi pliajn restad-tagojn, antaŭ- kaj post-kongrese.

La manĝejo estas ampleksa, sufiĉa por ni ĉiuj. La manĝoservo estas propra kaj bonkvalita, kun unua kaj dua pladoj plus deserto; ne eblas elekti, sed ĉiuj dietaj bezonoj/preferoj estos atentataj kaj ĉiam abunde disponeblos libere preneblaj salatoj. Ili ankaŭ preparas saketojn kun manĝaĵoj por kunporti.

La restadejo disponigas diversajn aliajn servojn. Ekstere estas sportejo kaj naĝ-baseno. Interne estas moderna kaj ampleksa gimnastikejo, komputilĉambro, legoĉambro, ... Ĉiuj ĉi servoj estas senpagaj. Estas ankaŭ tolaĵ-lavejo kun lav-maŝinoj, sekigiloj kaj gladiloj.

En somero estas facile parki, senpage, en la proksimeco de la restadejo. Ne estas limigoj al la eniro kaj eliro de la restadejo, tio eblas eĉ dum la tuta nokto.

Estas bus-haltejo kaj metroo-stacio tuj apud la restadejo. Malpli ol duonhoro sufiĉas por translokiĝi al la plej centra parto de Madrido. Eblas ankaŭ, kaj rekomendindas, alveni el la flughaveno per metroo. Tio estas plej rapida kaj tre malmultekosta.

Pliaj informoj ĉe: http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.HTML **Pedro Sanz**



Poezio: Armilo sarĝita de futuro

La 72a HEF-kongreso vere sukcesis. Sub la moto *lingvo kaj sento* disvolviĝis diversaj programeroj, la plejmulto el kiuj orbitis ĉirkaŭ poezio. Substrekindas, ke la kongresanaro grandnombre ĉeestis la prelegojn. Sed multe pli substrekindas, ke la ĝenerala publiko mergiĝis en la temojn, aktive partoprenis diskute aŭ deklame... ĝuis lirikon, faris ĝin sia. Kaj tio pruvas, ke poezio estas afero ne elitisma, sed ĉiesa; ke, kiam oni proponas ĝin ame kaj digne, la homoj ĝin akceptas kore kaj anime.

Miaflanke, neforgeseblas la belaj momentoj travivitaj dum la prezento de mia baldaŭ aperonta libro *Poezio: armilo ŝargita per futuro*. La grandaj atento kaj entuziasmo de nia diligenta kolegaro igis vibri la kordojn plej profundajn de mia spirito. Dankon do, geamikoj. Dankon ankaŭ al ĉiuj, kiuj manifestis al mi sian intereson al ĉi verko. Ja ĉio ĉi larĝe kompensas la multajn horojn da penado super tiom da versoj kaj aldoniĝas al la same multaj horoj da krea ĝuo, kiujn mi pasigis ĉi-taske.

Poezio: armilo ŝargita per futuro estas komentita esperanta antologio de hispanlingva poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia. Konsistigas ĝin 182 poemoj el 35 poetoj, krom historia-literatura enkonduko, abundaj komentoj kaj klarigoj, kaj eĉ kelkaj eseoj. Jen iuj el la bardoj en ĝi: Federico García Lorca, Rafael Alberti, Luis Cernuda, Miguel Hernández, León Felipe, Gabriel Celaya, Blas de Otero, Jaime Gil de Biedma, José Agustín Goytisolo, Marcos Ana, Pablo Neruda, Eduardo Galeano...

La verkon publikigos SATeH, kaj la oficiala prezento havos lokon en Madrido, kadre de la 86a SAT-kongreso okazonta de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2013. Mi kaptas ĉi ŝancon por arde rekomendi al vi ne fordormi la okazon ĉeesti tiun universalan kongreson plenan de allogaj debatoj, spektakloj, ekskursoj kaj eĉ aparte sukaj postkongresaj tagoj 5a, 6a kaj 7a de aŭgusto. (Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe la SAT-paĝo, precize ĉe [http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html]).

El la poemoj konsistigontaj la antologion, kiujn mi deklamis en mia prelego en Zaragozo, mi proponas al vi jenan kiel omaĝon al la karmemora aragonano José Antonio Labordeta, kiu forpasis antaŭ tri jaroj sen ke li vidus la de li revatan landon "nomatan la liber' "

KANTO AL LA LIBERO

(En traduko de Miguel Fernández)

Alvenos ja la tago,
en kiu ĉe kap-levo
ni ĉiuj vidos Landon
nomatan la liber'.

Jen, frato, miaj mano
kaj frunto viaj estos,
via ĉiama gesto
forfalos sen la kre'
de timo-uraganoj
ĉe ŝpruco de liber'.

Konstruos ni la vojon
sur tute sama bazo,
ŝultro-ĉe-ŝultre kunaj,
tiel ke eblu lev'
de l' homoj, kiuj falis
kun krio al liber'.

Alvenos ja la tago,
en kiu ĉe kap-levo
ni ĉiuj vidos landon
nomatan la liber'.

Sonoros sonoriloj
el la sonorilturoj,
kaj sur dezertaj kampoj
grajniĝos re la gren'
kun altaj spikoj pretaj
fariĝi pan-projekt'.

Pan', kiu dum jarcentoj
neniam disdoniĝis
al ĉiuj homoj, kiuj
laŭeble, fortostreĉe,
la historion puŝis
direkte al liber'.

Alvenos ja la tago,
En kiu ĉe kap-levo
Ni ĉiuj vidos landon
nomatan la liber'

Tre povus esti tamen,
ke ĉi matenon belan
nek vi nek mi, neniu,
ekvidos en la viv',
sed endas ĝin perforti
nur por ebligi ĝin.

Ĝi estu kiel vento,
kiu elsarkas vepron
por ke elĝermu ver'
kaj elpurigas vojojn
je rub' el la jarcenta
batal' kontraŭ liber'.

Alvenos ja la tago,
en kiu ĉe kap-levo
ni ĉiuj vidos landon
nomatan la liber'.

Miguel Fernández

VIVU LA TEATRO!
Omaĝo al la Teatro dum la 86-a SAT-Kongreso

Kadre de nia madrida SAT-kongreso ni projektas fari omaĝon al la teatro. Ni ŝatas teatron kaj teatri. Ni pensas, ke se ne ĉiu el ni estas iu Laurence Olivier, iu Chaplin, iu Pavarotti ktp... ja multaj el ni povus digne elturniĝi sursceneje, feliĉi kaj feliĉigi aliajn per la magio de teatro. Ni pensas do pri spektaklo ludota de ĉiuj kongresanoj kun minimume digna arta nivelo interesataj en ĉi omaĝo. Kompreneble, nia diseco ne permesus al ni munti formalan teatraĵon, sed eblus kunmeti unuopajn etajn ludadojn en tutan spektaklon, nian komunan verkon. Ĉiuj kompanoj kapablaj voĉlegi aŭ reciti poemon, prezenti etan monologon, mimadi, unuope aŭ grupe ludi muzikilon aŭ kanti ktp petatas al partopreno. Bonvolu kontakti nin ĝis la fino de junio (miguelfer18@yahoo.es). Surbaze de ĉiuj proponoj ricevitaj ni kreos rakontan fadenon kaj fonmuzikon laŭan al la naturo de la ludotaĵoj. Surloke, ni faros ĝeneralan provludon antaŭ la definitiva prezento.

Geamikoj, ek do al la scenejo!

Sanon kaj teatron!

Miguel Fernández

La 4-a Printempe en Dahlem-Baasem 30.3. - 6.4. 2013

La Paska semajno organizita de EsperantoLand sub la gvido de Lu Wunsch-Rolshoven okazis fine de marto kaj komence de aprilo en *Dahlem-Baasen* meze de la *Eifel* regiono en Germanio. Partoprenis ĝin malgranda grupo de 12 geesperantistoj el Belgio, Francio kaj Germanio. Ni povis pli bone konatiĝi kaj ĝui agrablajn tagojn en la neĝkovrita pejzaĝo. La feria domo troviĝas en iom izolita loko duonĉirkaŭata per arbaro. Ĝi posedas ĉion por bona komforto de la uzantoj, eĉ naĝejon. Ĉiutagaj manĝoj estis abundaj kaj bongustaj. Por festi Paskon, ne mankis ĉokoladaj kaj koloraj ovoj kaj ankaŭ bongusta ŝafidforma kuko. De la manĝejo videblis la vilaĝo *Baasem*.

Ni aŭskultis prelegojn kaj ĝuis bildprezentadojn pri vojaĝoj prezentitaj de la partoprenantoj. Marcel Delforge rakontis pri sia vojaĝo per Transsiberia trajno survoje al Azia kongreso en Mongolio kaj pri interesa ŝipado kaj navigado tra la Danuba Delto en Rumanio. Oni spektis tri filmetojn, kiuj gajnis konkurson rilate al Esperanto. Tre interesa estis filmo pri Sumatro de Jean François Cousineau dum lia vojaĝo tra tiu ekzotika lando. Liba kaj Floreal Gabalda prezentis filmojn pri Venezuelo kaj ties folklora vilaĝfesto.

Ni piedpromenis en la proksima ĉirkaŭaĵo, vizitis la urbeton *Kronenburgon* kaj promenis laŭlonge de ĝia lago. En *Bad Münstereifel* ni admiris historian centron kaj plu-ekzistantajn fortikaĵojn. Ĝi apartenas al la plej bone konservitaj mezepokaj urboj en *Rheinlando*. Ravis nin la pitoreska urbo *Monchau*, situanta en rokeca valo de la okcidenta parto de la *Eifel* regiono en proksimeco de la belga landlimo.

Marcel vespere rakontis pri aventuroj de Michel Schmitz kaj la gastejo *Baraque Michel*, kiu rilatas al tiu regiono. En la urbeto *Nettersheim* ni vizitis naturcentron kaj ties ekspozicion pri la naturo kaj historio de la regiono kaj poste ni promenis en la ĉirkaŭaĵo. Revene ni haltis por admiri la kastelon *Ŝmidtheimon*. En ĉiuj vizititaj urboj ni post la promenado kafumis kaj teumis dum agrabla babilado. Por viziti la urbon Kolonjon ni veturis trajne. La stacidomo troviĝas en apudeco de la mondfama katedralo. Promenante ni vizitis la urbodomon, *Mikŭeon* - la judajn ritualajn banojn, parfumejon, ĉokolad- kaj mustard-muzeojn.

Ĉiu-matene ni konversaciis kaj pridiskutis diversajn temojn: pri pasko-kutimoj kaj simboloj (ovoj, leporo, sonoriloj), pri diversaj E-aranĝoj en Germanio, Francio kaj aliloke. Oni povis konsulti fotoalbumojn kun raportoj pri diversaj Esperanto-eventoj, kiujn mi alportis. Aliaj temoj estis pri malfacilaĵoj kaj lingvoproblemoj. Ne mankis amuzaj ludoj kaj iom da dancado. Vizitis nin du esperantistoj loĝantaj en la regiono.

Lu Wunch-Rolshoven prelegis pri klimatgasa kompensado: (kompensado de produktitaj forcej-efikaj gasoj), ŝparo de energio, uzado de vojaĝrimedoj, varmigado, aĉetado-konsumado, alternativa energio (suno, vento...).

Ĉe la fino ni esprimis opiniojn pri la semajno. Resume ni povas diri, ke ĝi bone disvolviĝis kaj ni pasigis tre agrablan Pasko-tempon en la bela pejzaĝo de la *Eifel*-montaro, malgraŭ la malvarma vintra kaj neĝa vetero. Espereble venontjare la printempo venos ĝustatempe por ebligi ĝui vekiĝantan naturon kaj sunplenajn tagojn.

Liba Gabalda

Printempo venis kun Rafaelo

Unuan fojon mi konatiĝis kun Rafaelo pasintjare en Jalto dum la SAT-kongreso, kies organizanto mi estis. Mi memoras, ke veturonte al la kongreso, li avertis min, ke volas instrui Esperanton, kaj ke jaron antaŭe li instruis en IJK en Kievo kaj lia E-kurso plaĉis al la kursanoj. Mi akceptis tion sen troa entuziasmo kaj eĉ kiam li instruis, mi ne tre interesiĝis. Mi rimarkis nur, ke dum la lecionoj estis multe da gajo kaj rido. Tamen mi ofte babilis kun li kaj kiam li demandis pri la ebleco alveturi post duonjaro Jalton kaj instrui Esperanton, mi ne rifuzis, ĉar mi esperis, ke anonco pri la hispana instruisto helpos altiri homojn al la kurso.

Nun iomete pri Jalto kaj mi. Jalto estas la plej populara ripozurbo ne nur en Ukrainio, sed ankaŭ en Rusio. Mi estas gvidanto de la plej aktiva E-klubo Tero en Ukrainio, kaj eksprezidanto de Ukrainia E-Asocio. Ĉe la klubo estas E-teatro, kiu prezentas spektaklojn laŭ rakontoj de la fama rusa verkisto kaj dramverkisto Anton Ĉeĥov en multaj E-renkontiĝoj kaj festivaloj de Eŭropo. Ankaŭ estas turista E-sekcio ĉe la urba montara klubo.



Por akcepti Rafaelo ni bezonis trovi nemultekostan komfortan loĝejon por li kaj pagajn kursojn de la hispana kaj Esperanto. Trovi homojn, dezirantajn lerni la hispanan kontraŭ malpli da mono ol oni pagas en oficialaj kursoj, ne estis problemo. Pli komplike estis varbi dezirantojn lerni Esperanton, ĉar la angla "premas" dum la junularo estas nun tre stereotipa: "la angla estas internacia lingvo, Esperanto estas mortinta lingvo". Estus facile komprenigi gejunulojn, ke la vero estas ne tiom simpla, sed por tio necesus altiri ilin al renkontiĝo.


Do, fine de januaro ni anoncis pri la kurso de Rafael en la universitato, urba biblioteko kaj kreis en reto paĝon en la rusa, invitante partopreni la unuan malferman lecionon. Venis ĉ. 25 homoj. Poste ni komprenis, ke preskaŭ ĉiuj estis varbitaj persone de esperantistoj. Bona sperto por estonto por ne malŝpari tempon kaj energion por la afiŝoj k.a.

Komence de februaro ekis E-kursoj ĉe universitato (ĉ.20 homoj) kaj anglalingva lernejo (10 lernantinoj). Mi volas rimarki, ke en februaro en Jalto jam aperas la unuaj floroj, ni eksentas printempon. Kaj ni ŝercis, ke printempo venis kun Rafaelo.



Ni estas kontentaj pri la kurso ĉe universitato, ĉar restas ĉ.15 homoj. Ili ĉiuj ekparolis, eĉ la plej problemaj. Dum liaj lecionoj ĉiam regas gajo, la kursanoj venas kvazaŭ al festo. Rafaelo estas plena de bonkoro, amo kaj humuro kaj tio alportas sukceson. Lia metodo estas tute persona, ne kopiebla, ĉar la lecionoj estas improvizaj, Tamen ĝi estas tre utila por kursgvidantoj, ĉar ĝi ebligas kopii kelkajn gravajn elementojn de la instruado. Esperanton mi instruas dum pli ol 50 jaroj laŭ propra metodo, kies unuaj lecionoj estas rektmetodaj. Sed ankaŭ al mi la E-kurso de Rafael estis tre utila.

Partopreno de Rafael ne limiĝis nur je la instruado. Li vizitadis en Jalto Socian organizaĵon de junaj handikapuloj kaj veturis al urboj Ĥarkovo, Poltavo, Simferopolo kaj Odeso, kie esperantistoj organizis renkontiĝojn kun li cele revivigi E-movadon. Verŝajne la plej grava rezulto de la vojaĝoj estas tio, ke odesanoj invitis lin instrui Esperanton, kio okazos septembre-novembre de la nuna jaro.



Adiaŭante Rafaelon, la jaltanoj arde dankis lin kaj nomumis lin Honora membro de la klubo Tero.

Jefim Zajdman

Eŭropa Unio kaj klimatosanĝo

Dum la lastaj jardekoj la situacio de la medio, suferis gravajn damaĝojn. La mondo estas minacata de la industria funkciado, de la amasa konstruado de loĝejoj ne ĉiam en la plej taŭgaj lokoj, nocaj gasoj, plastikaĵoj, nigraj tajdoj ktp, iuj kaŭzas malekvilibran evoluon kaj neelteneblajn situaciojn.Tamen tiu konscio komenciĝis malfrue, nur post gravaj poluciaj akcidentoj okazintaj sur la tero, en la riveroj, en la aero kaj en la maroj.



Ĉio ĉi kaŭzas fenomenojn kiel damaĝon al la ozontavolo, senarbarigon, klimatŝanĝon, akumuladon de rubaĵoj, perdon de biodiverseco kaj fine povas trafi la homan vivon.

Unesko aprobis la Programon *Homo kaj Biosfero (*angle *Man and Biosphere)*, uzante la terminon *biosfero* por nomumi la tutan medion. La biosfero estas tiu parto de la tero en kiu koncentriĝas kaj evoluas la vivo. Temas pri fajna tavolo kiu ĉirkaŭas la teron, konsistanta el la malaltaj partoj de la atmosfero, la oceanoj, la surfaco de la tero, do tie kie vivo eblas. En la oceanoj, la vivo okazas tie kien eniras lumo, kiun permesas vivi la fitoplanktono kaj zooplanktono kaj eĉ en la marfundoj estas vivestaĵoj. Do, oni substrekas la devon konservi la interrilaton homo-medio, kiu devas esti ekvilibra por la postvivado de la homaro.



Inter la multaj gravaj temoj kiujn Unuiĝintaj Nacioj (UN) traktis por protekti la medion, ni elstarigos la defendon de la tutmonda klimato. Post la Konferenco de Stokholmo pri la Homa Medio, de 1972, dudek jarojn poste, en 1992, U.N. alvokis al *Konferenco pri Medio kaj Evoluo,* ĉifoje en Rio de Janeiro (Brazilo), kiu estis vera pintkunsido pri la medio. La konferenco estis grava, kun partopreno de 176 ŝtatoj, 1.200 internaciaj organizoj, multaj neregistaraj organizoj kaj 2.500 ekologiistaj grupoj, do, temis pri la ĝis nun konata plej multnombra konferenco pri la zorgado de la medio.

Inter la Deklaracioj kaj dokumentoj, estis du devigaj traktatoj: Konvencio pri la Klimatŝanĝo kaj Konvencio pri la Biodiverseco.

La traktato pri la klimatŝanĝo subskribita en Novjorko en 1992, estas iom nepreciza, kaj restis kiel bazo por venontaj traktatoj. Tamen ĝi enhavas gravajn difinojn. Al tiu sekvis diversaj protokoloj kiel tiuj el Kioto, Montrealo, kaj pluraj konferencoj kiel tiuj okazintaj en Balio en 2007, en Kopenhago en decembro 2009, kaj la kunsidoj en Durban kaj Koĉabambo.

La tutmonda klimatŝanĝo estas difinita en la Traktato, kiel "*klimatŝanĝo kaŭzata rekte aŭ nerekte de la homa agado kiu difektigas la tutmondan atmosferon kaj kiu adiciiĝas al la naturaj ŝanĝoj de la klimato, observitaj dum kompareblaj tempoperiodoj"*. Aliflanke, la klimato estas konsiderata *komuna heredaĵo de la Homaro*

En tiu konvencio oni volis batali kontraŭ la t.n. tutmonda klimatŝanĝo, forceja efiko, kaj la acida pluvo.

Tamen tiu konscio komenciĝis malfrue, nur post gravaj poluciaj akcidentoj okazintaj sur la tero, en la riveroj, en la aero kaj en la maroj. La aktuala klimatŝanĝo, laŭ la plej granda parto el la sciencistoj, ne okazas pro diversaj naturaj fenomenoj kiel en la pratempo, sed pro ni mem kaj nia vivmaniero. La sciencistoj konstatis ke ekde la komenco de la 20-a jarcento, kaj ĉefe post la 7-a jardeko, la temperaturo de nia planedo pliiĝis 0,7 ºC averaĝe, ĉar en kelkaj sudaj partoj de la tero, tiu pliiĝo estas pli ol tiu cifero.

Ni certe pensas ke 0,7 ºC laulonge de kelkaj jaroj ne estas tro, tamen por nia biosfero tio signifas multe. Pro tio studante la klimaton kaj la vivon sur la tero, la pliiĝo je unu centigrado estas tute grava fenomeno, nekonata en Eŭropo dum la lastaj 5.000 jaroj. Pro tio *la celo nun estas ne atingi la nivelon je 2º C en la jaro 2050. Superi tiun ciferon kaŭzos terurajn fenomenojn kiel la mankon de akvo kaj nutraĵoj, ekstremajn metereologiajn fenomenojn kaj gravan damaĝon de unikaj eko-sistemoj.*

Unu el la plej gravaj konsekvencoj de tiu klimatŝanĝo estas *la varmigado de la terglobo*, la t.n. *forceja efiko*. *Forcejoj* estas tiuj kovritaj ejoj, per plastikaĵoj aŭ vitraĵoj, kie oni produktas diver-sajn fruktojn kaj legomojn. Do, simile okazas en la klimato de nia terglobo, kiu post la homaj aktivaĵoj kaj poluado ne nur influas en la flaŭro, faŭno, naturaj estaĵoj, la oceanoj, sed eĉ en la sano de homoj, per tre diversaj malsanoj, ĉar la tera atmosfero estas komparebla al la vitroj de giganta forcejo.

La sciencaj opinioj kiel la esprimita de la Interregistara Komitato de UN pri Klimatŝanĝo kaj specife subtenata de la naciaj sciencaj akademioj de la G8-nacioj, estas ke "la averaĝa tutmonda temperaturo kaj la varmigo observata dum la lastaj 50 jaroj estas atribuebla al la homa agado". Malgranda plimulto de kvalifikitaj sciencistoj kontestas tiun vidpunkton, asertante ke la agoj de la homaro ne grave rolus en la lastatempa temperatura ŝanĝo.

Tiujn ŝanĝojn nuntempe oni vidas pro la jenaj situacioj: *La glaĉeroj malgrandiĝas kaj leviĝas la nivelo de la oceanoj.*

La montaraj glaĉeroj, tiuj imponaj langoj da glacio kiuj staras en la ĉefaj montaroj de la planedo, estas speciale senseblaj al la klimatŝanĝoj, pro tio la glaĉeroj kaj la polusoj estas konsiderataj kiel gravegaj montriloj de tiu tergloba varmigo. Nur en Eŭropo, la Alpoj perdis dum la lasta jarcento proksimume trionon de sia glacio, kaj ekde 1980 perdis inter 20 kaj 30% de la restanta glacio. La Kilimanĝaro degelas same ol Groenlando kaj la frostigitaj teroj de la Siberia tundro, Kanado kaj Groenlando, kiuj enhavas muskon kaj likenojn post la lasta glacia epoko: post degelo diseriĝas en metano, gaso kies forcejefiko estas tre forta, kaj kaŭzas la rompon de naftoduktoj kaj vojoj en Siberio kaj Alasko.

La duan konsekvencon oni sentas en la maroj.

La sciencistoj asertas ke ekde 1960, laŭ la informoj ricevitaj de la satelitoj, la marnivelo altiĝas pli ol po 2 milimetroj jare proksimume, kaj ili atribuas tiun fakton al la klimatŝanĝo, kiu degeli-gas la glaĉerojn kaj la polusojn. Konsekvence, tiu ekstra volumo da akvo iras al la maro kaj ali-flanke la varma temperaturo ekspansias la oceanojn. Tiu altiĝo de la marnivelo havos dramajn rezultojn en kelkaj zonoj de nia planedo.

Fine, en la maro, oni perdos marajn speciojn, plimultigos la fitoplanktonon, kaj la temperaturo de la maro fariĝos pli alta.

Fine, kiel jam dirite, *ni havos klimatologiajn ekstremajn fenomenojn*.

Unu el la konsekvencoj de la tutmonda klimatŝanĝo estas la plia ofteco de ekstremaj atmosferaj ŝanĝoj kaj katastrofoj rilataj al la klimato. Varmbatoj, huraganoj, inundoj pro pluvego ktp. ne nur en la zonoj kie kutime okazas tiuj fenomenoj, sed en aliaj kie ili neniam ĝis la nuna jarcento okazis, ekzemple, en Eŭropo.

Kompreneble, la jaroj pasas kaj Unuiĝintaj Nacioj planas novan traktaton pri la klimato.

Pro tio, la membroj de U.N. lanĉis, je la fino de 2011, en Durban, la ideon intertraktadi novan tekston pri la Klimato kaj fiksis la daton: 2015. La traktato de 2015 devos unuigi la aktualan devigajn kaj ne devigajn normojn de la nuna traktato kaj de la Protokolo de Kioto.

Kune kun la internaciaj intertraktadoj, paralele al la laboro de la Platformo Durban, oni jam serĉas redukti la ellasadon de forcejaj gasoj en la mondo, antaŭ la devigo de la traktato de 2015, kiu estos proksimume la jaron 2020, por stabiligi la varmigon de la terglobo je 2 centigradoj, aŭ malpli.

Kaj en tiu kunteksto, Eŭropa Unio ne volis resti sen apogi efektive tiun ideon, pensante havi komunan pozicion rilate tiu estonta traktato, ĉar fakte tiu organizo prenas decidojn devigajn por la nunaj 27 membroŝtatoj.

La Eŭropa Komisiono adoptis la 26-an de marto 2013, konsultan dokumenton por malfermi publikan debaton pri la estonta internacia Traktato pri Klimatsanĝo de 2015.

S-ino Connie Hedegaard, eŭropa komizaro pri Klima Agado deklaris jene: *En Kopenhago la mondaj gvidantoj fiksis la celon teni la varmigadon de la terglobo sub 2º por eviti la gravajn konsekvencojn de la klimatŝanĝo. Ili pravis. Sed ni konstatas ĉiutage, ke la mondo malproksimiĝas de tiu celo, do oni bezonas fari ion plu, ĉefe plian kunlaboron inter ĉiuj. La nuna dokumento proponas fiksi pozicion de Eŭropa Unio kaj kontribui al sukceso de traktato, en 2015.*

Tiu debato daŭros ĝis junio 2013, kaj venontjare, en Bruselo, okazos eŭropa konferenco pri tiu temo.

Tiel, la Komisiono analizos poste la ricevitajn respondojn, kiuj konsistigos la komunan pozicion de Eŭropa Unio pri la nova Traktato pri la Klimatŝanĝo de 2015.

La rolo de Eŭropa Unio en la sfero de la medioprotektado estas tre grava. Kompreneble, la originaj traktatoj, nome, la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo (1951) kaj la traktato pri la fondo de Eŭropa Komunumo kaj tiu pri Atomenergio (1957), enhavis nenion pri medioprotektado, ĉar en tiu momento neniu zorgis pri tio. Sed en 1972 la Eŭropa Komunumo (EK) partoprenis la Konferencon pri la Homa Medio, en Stokholmo, kaj en oktobro de la sama jaro, en Parizo okazis la Pintkunsido de Ŝtatestroj kaj Registarestroj, havante de tiam novajn objektivojn pri medioprotektado. Tiel komenciĝis serio da Programoj pri Medio, la unua de 22 novembro 1973, kun

ĝeneralaj celoj, kaj pensante jam pri internacia kunlaboro. Sed, kompreneble, fakte ne estis en la traktatoj iu artikolo por protekti la medion, do, ili uzis la artikolojn plej proksimajn por tiu celo, kaj ĉefe la tiaman art-n 235 kiu permesis agi al la Komunumo, kiam estos necese plenumi difinitan celon, kvankam la traktato silentas.

Sekvis dua, tria kaj kvara Programoj, ĝis 1992, grava dato, ĉar la Traktato de Maastriĥto kreis la Eŭropan Union kaj samtempe agnoskas kiel objektivon la "politikon pri Medioprotektado". Jam estis vera komunuma politiko, ne ekskluziva, sed komuna kun la membroŝtatoj

La 5-a Programo pri Medioprotektado estis aprobita la 15-an de decembro 1992, kaj celas ankaŭ la helpon al la neevoluintaj landoj. Tiu Programo havas tre interesan titolon, nome *Politiko pri Medioprotektado kaj daŭropova evoluo, kiu respektos la medion*, kaj ekmarŝis laŭ la tendencoj de la Konferenco de UN pri Medio kaj Evoluo de Rio de Janeiro de 1992. La termino "daŭropova evoluo", naskiĝinta en Rio de Janeiro, estas ene de tiu programo kaj la sekvonta.

Fine la sesa Programo pri Medioprotektado, titolita ĉifoje *La estonto estas en niaj manoj,* en kiu oni substrekas la bezonon agi je ĉiu nivelo: nacie, regione, kaj internacie. Ĝi memorigas la bezonon zorgi pri la klimato, la biodiverseco, la rilato inter medio kaj sano, kaj limigi la rubaĵojn. Fine, oni asertas ke la protektado de la medio integriĝos en la aliaj komunumaj politikoj. La sepa Programo sekvas la saman vojon, kaj la Traktato de Lisbono aplikas tiujn celojn.

Sed kiel funkcias la Eŭropa Unio tiucele? La EU estas subjekto de Internacia Juro kaj havas la rajton subskribi traktatojn kaj aliĝi al ili. Kutime, la EU, kiel antaŭe la Eŭropa Komunumo subskribas kaj aliĝas al jam ekzistantaj konvencioj pri protektado de ĉiu difinita spaco. Tiam tiuj subskribitaj konvencioj estas rekte aplikeblaj al la membroŝtatoj.

Tiu principo de la superrego de la Eŭropunia kaj komunuma juro sur la membroŝtatoj estis ĉiam asertita de la Justica Kortumo de Eŭropa Unio.

Sed la membroŝtatoj devas apliki tiun leĝaron, kaj pro tio la Eŭropa Komunumo kaj nun la Eŭropa Unio uzas kutime Direktivojn. La eŭropunia derivita juro konsistas ĉefe el Regularoj, Direktivoj kaj Decidoj. La Regularojn oni uzas por ĝeneralaj celoj kaj por ĉiu lando de la EU. Kompreneble, Regularo estas tro ampleksa por fiksi al iu difinita membroŝtato normojn kiam okazis poluado de la aero, de la maro aŭ alia problemo. Oni kutime uzas la Direktivojn, kiuj estas adresitaj al difinita ŝtato kiu devas plenumi la celon de la normo, uzante la rimedojn kiujn la ŝtato konsiderus plej efikaj. Do, estas normo por plenumi libermaniere la celon. Ne gravas kiu aŭtoritato plenumos ĝin, sed ĝi ĉiam devas esti rekte aplikata pro la superrego de la eŭropunia juro.

Do, tra ĉiu internacia leĝo pri la medio, ni konstatas ke ni estas antaŭ neforta juro, plena de konferencoj jure nedevigaj, de rekomendoj, eblecoj, sed malmultaj devigaj tekstoj, escepte de la internaciaj traktatoj kaj la leĝaro de la Eŭropa Unio. Kaj tamen Eŭropa Unio defendas la klimaton kaj la biosferon, esencajn esprimojn de la Komuna heredaĵo de la homaro. Do ni havas gravan respondecon por la defendo de kolektivaj ekologiaj interesoj, kiujn oni devas defendi por la tuta homaro

Ni esperos ke la proponoj kaj ĉefe la respondoj de la ŝtatoj al tiu venonta Traktato pri la Klimato estu favoraj por la bono de la homaro.

Maria Rafaela Urueña


ESPERANTO
2013
Lingva justeco